



Komencanto

Kiel tio komenciĝis

Rakontas Aldo Grassini,
prezidanto de
Itala E-Federacio

Bondeziroj el la tuta mondo

al legantoj de la revuo

Verkoj de niaj legantoj

Prozaĵoj originalaj kaj
tradukitaj

Impreso – nova rubriko de “K”

Zamenhof-strato
Haikoj

Gramatiko ŝerce kaj serioze

Proverboj por
komencantoj
Pri “ĉu” kaj “aŭ”


Aforismoj kaj Humuraĵoj pri hundoj

La praktiko

“Esperantaj Aspirantoj” -
nova muzika grupo el
Germanio

Korespondul

Dezirantoj korespondi el la
tuta mondo



bildon sendis Loĵkina Nadeĵda [Glazov, Rusio]

internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

2006

januaro – februaro

1 (57)

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

- UEA** - Universala Esperanto-Asocio,
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando
- Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.
- Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson
St., Redfern N.S.W. 2016
- Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,
Antwerpen
- Brazilo** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia
(DF) - BR - 70084-970
- Britio** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Carlisle, ML8 4QT
- Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strŕznice
- Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,
Beijing
- Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.
- Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.
- Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
- Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Ceri-
saie, 75004, Paris.
- Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,
9 D-55129 Mainz.
- Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.
- Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,
TEHRAN
- Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Mi-
lano.
- Italio, Kroatio, Slovenio** Viŝnja Brankoviĉ
Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste
- Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,
Dublin 6W
- Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3
- Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-
08200, Sabadell
- Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa
11300, Havano
- Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k.
167.
- Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,
N-0572 Oslo
- Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,
Christchurch 8004
- Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-
137, PL-01-865 Warszawa
- Portugalia** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa
- Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum,
Husarlyckeavagen 29, SE — 24294 Horby
- Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH —
4224 Nenzlingen
- Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El
Cerrito, California 94530, U.S.A.

Ni varme salutas malnovajn kaj novajn legantojn de "Komencanto" kaj esperas, ke nia revuo ankaŭ ĉi-jare estos por vi ne nur legaĵo, sed loko kaj spaco por nia krea kunlaboro kaj intensa interkomunikado. Ni dankas ĉiujn, kiuj sendis siajn komentojn, opiniojn pri la pasintjara jarkolekto kaj proponojn por la estonto.

Spekto de la materialoj, kolektitaj en tiu ĉi kajero, kiel kutime, estas vasta. Espereble, bonan impulson por agi, krei, perfektigi donos gratulvortoj kaj bondeziroj, senditaj al vi, karaj legantoj, de eminentaj esperantistoj el la tuta mondo.

Rubriko "Kiel tio komenciĝis" ĉi-foje prezentas al vi prezidanton de Itala E-federacio Aldo Grassini, mirindan kaj multifacetan personon, kies internaj spiritalaj fortoj profunde impresas iun ajn. Historio de la vivo kaj esperantistiĝo de Aldo estas vere heroeca: homo, kiu de frua infaneco perdis la vidkapablon, povis tiom da multe atingi en sia vivo kaj en E-agado — estas preskaŭ nekredeble, sed estas ja tiel.

En "Verkoj de niaj legantoj" vi povas legi originalan rakonton de aŭtorino el Finnlando Raita Pyhällä. "Ĉe la manĝujo de birdoj" estas debuto de Raita sur la paĝoj de "K". Ni esperas, ke vin plezurigos temo de la rakonto, trafaj observoj de la aŭtorino kaj vi ekscios nomojn de multaj birdoj. Espereble, ke la originala rakonteto de Ludmila Leksina kaj la traduko de Tatjana Vŝivceva (ambaŭ aŭtorinoj estas bone konataj laŭ antaŭaj publikaĵoj) ankaŭ plaĉos al vi.

Verŝajne malnovaj legantoj de "K" rimarkis aperon de nova rubriko "Impreso". Se iu el vi ne sentas sin dume preta verki en Esperanto rakontojn, poemojn ktp, vi povas provi simple skribi transdoni vian impreson de iu interesa legaĵo, aŭ de vojaĝo, priskribi eventon, kiu altiris vian atenton. Tiuj viaj provoj jam signifos la venkon super inercio kaj povas instigi vin al plua verkado. En la nova rubriko vi povas legi ĉi-foje du verkojn en formo de impreso, ricevitajn de niaj legantoj Aida Kiyoshi kaj Kurita Kimiaki el Japanio.

En tradicia rubriko "Gramatiko ŝerce kaj serioze" vin daŭrigas ĝojigi per siaj originalaj "lecionoj" J-L. Tortel el Francio. Ĉi tie vi ankaŭ trovos amuzan poemeton, kiu estas nova tradukaĵo de poeto Sylla Chaves el Brazilo, kaj kiun li donacis al "K".

Esperanto vivas nur tiam, kiam ni, esperantistoj, vigle ideas, agas, praktike aplikas la lingvon — jen esenco de ĉiuj publikaĵoj de rubriko "La praktiko", kie ni prezentas ĉi-foje aktivajn de Grigory Grin, kreinto de E-muzika grupo "Aspiro", kaj publikigas intervjuon kun li. Se vi ekinteresiĝos pri "Aspiro", vi povos rete kontakti la "aspirantojn".

Ni deziras al vi agrablan legadon de la unua ĉi-jara kajero kaj atendas viajn kontribuojn!
la Red.

Komencanto

2006 numero 1 // (57) regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

kunredaktas Raja Kudrjavceva

adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2006:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 180 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яш. 132.

Monde konata esperantisto, prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, dum pluraj jaroj estrarano de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj kaj de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj, doktoro pri filozofio, fondinto kaj direktoro de la Nacia porblindula Muzeo, fondinto kaj prezidanto de Ancona asocio de operŝatantoj. Prezidanto de LKK – Loka Kongresa Komitato de la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco.

Por rigardi al la mondo!

Esperanto: senfermila fenestro

de Aldo Grassini


Mi estis juna gimnaziano, kaj iam sinjoro, kiu estis por mi kvazaŭ patra gvidanto, metis en miajn manojn malgrandan libreton en brajlo, kaj diris al mi: "Lernu Esperanton! Per ĝi vi povos komuniki kun homoj tra la tuta mondo."

"Esperanto... Esperanto..." Mi jam aŭdis tiun vorton! Jes, mi aŭdis antaŭ kvar jaroj de iu kunlernanto, kiam mi estis en la instituto por blinduloj en Bologna.

Fakte, kiam mi estis sesjara knabeto, ludante per postmilita bombo, kiel ludas multaj senkulpaj nesciaj infanoj, okazis tiu fulmo, tiu tondro kaj poste mallumo en mia vivo. Dum mia lernado mi ankaŭ restis kelkajn monatojn en la blindula instituto, kaj tie pli aĝa kunlernanto montris al mi libron, en kies titolpaĝo mi legis: "Radikaro esperanta-itala", kaj li fiere klarigis: "Esperanto estas internacia lingvo. Mi vizitis kurson pasintjare, kaj mi iom parolas ĝin!" Mia scivolemo ne estis satigita: post malmultaj tagoj mi malsaniĝis kaj forlasis la instituton.

Kaj nun denove! Sinjoro Romagnoli proponas al mi lerni Esperanton! Romagnoli estis tre saĝa homo, li multon instruis al mi, eĉ brajlon li instruis... Kaj mi ekfoliumis tiun gramatikon: tre simpla, tre mallonga, nur kekldekoj da paĝoj! Sed tiam la lernoĵaro komenciĝis kaj mi, kiel diligenta lernanto, ne povis distriĝi per aliaj taskoj. "S-ro Romagnoli, la venontan jaron, kiam fermiĝos la lernejo, mi certe dediĉos min al Esperanto! Sed kiu donis al vi tiun libreton?" Romagnoli rakontis, ke antaŭ kelkaj semajnoj li troviĝis en Bologna, kie okazis Universala Kongreso de Esperanto, kaj iu amiko donacis al li tiun malgrandan grama-tikon.

Tra la tuta mondo! Eksterordinare! En miaj knabaj revoj mi ĉiam fantaziumis pri kontaktoj kun geknaboj el eksteraj landoj. Mia dekkvinjarula imagemo pensigis min pri estonta profesio plena je vojaĝoj tra la mondo kaj renkontiĝoj kun strangaj homoj parolantaj



strangajn lingvojn. En la lernejo mi jam studis la francan, kaj mi sopiris iam viziti Parizon!

Sed eksterlandano ŝajnis al mi estajo mita, neordinara homo, minejo plena je surprizoj kaj ekscitaj eltrovoj! Iam mi havis okazon paroli kun franca knabo kaj tio por mi estis mirinda evento! Je tiu aĝo la tempo malrapide fluas, sed la lernoĵaro finfine finiĝis. Kaj en junio 1956 (ho Dio! ĝuste antaŭ kvindek jaroj!) mi reprenis la libreton, kaj mi komencis studi ĝin. Post du semajnoj ĉio finita!

"Kaj nun, Sinjoro Romagnoli, kiel perfektigi?" S-ro Romagnoli estis en granda embaraso. Tiam en Italujo ne ekzistis alia gramatiko de Esperanto en brajlo; sed mi plu ĝenis lin per la sama peto. Finfine li trovis - ne demandu kiel! - trivoluman gramatikon en hispana lingvo. "Prenu tion, kaj provu!"

Mi iomete jam sciis Esperanton, sed tute ne la hispanan. Jes, la itala kaj la hispana estas parencaj, sed...

Mi provis, kaj la rezulto estis, ke mi plibone lernis Esperanton kaj samtempe ankaŭ iomete la hispanan. Du kolombojn per unu fabo, diras itala proverbo.

Tiam mi eniris en la novan sperton, komence tute sola. Sed mia iniciatemo ne restis senmova: jam komenciĝis la nova lernoĵaro, kaj mi planis organizi esperantokurson por miaj kunklasanoj. Romagnoli, kiu dume mem fariĝis esperantisto, havis amikon, kiu loĝis en apuda urbeto, kaj estis instruisto pri fremdaj lingvoj kaj ankaŭ esperantisto. Mi invitis lin fari kurson en Ancona, mia loĝurbo. Mi preparis flugfoliojn kaj disdonadis ilin tra mia tuta lernejo, mi venigis gramatikojn el eldonejo, mi petis gastigadon de la loka sidejo de Itala Blindul-Unuiĝo (la sekretario estis s-ro Romagnoli!), kaj... en tiu oktobra tago la salono estis plenkla plena je geknaboj, kiuj aŭskultis la unuan lecionon de Esperanto!

Sed rozoj havas ankaŭ dornojn: mia profesoro pri itala beletro eksciis pri mia iniciato kaj tute kontraŭstaris: laŭ li Esperanto ne estis serioza lernobjekto kaj mi ne rajtis distri miajn kolegojn per tia stultajo. Dum mia vivo mi neniam forĵetis la armiojn: ĉu mi faru tiam? Kaj mi ne faris, kvankam kelkaj miaj kunklasanoj estis fortimigitaj.

>>>

Sed lingvo estas komunikilo, kaj mi komencis komuniki per esperanto. Leteroj iris kaj venis, mia leterportisto komencis meriti eksterordinaran salajron!

Kiam mia patro donacis al mi magnetofonon, ankaŭ sonbendoj komencis iri kaj veni tra Eŭropo por konatigi mian voĉon kaj la voĉojn de miaj amikoj, kune kun niaj kantado kaj ludado. Mi jam estis efektiva esperantisto. Sed tre baldaŭ mi aktivigis en la movado. Mi estis 21-jara, kiam mi fariĝis sekretario de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj. Post kvin jaroj mi estis Ĝeneralsekretario de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, kaj post pliaj ok jaroj Prezidanto. Kia fulmrapida kariero!

Intertempe mi komencis vojaĝi per esperanto. 1964 estis jaro tre grava por la realigo de mia revo. Mi ekvojaĝis kun mia familio per tutnova Fiat 850. Celo: Bosnio. Tiam turismaj rilatoj inter Italujo kaj Bosnio tute ne ekzistis, kaj ni tie vere estis rigardataj kiel kuriozaĵo, kaj multaj homoj postkuris nin por admiri nian ruĝan aŭtomobilon! Sed mia korespondantino kaj ŝia familio estis eksterordinare gastigemaj en sia modesta domo! Post unu monato okazis mia dua vojaĝo per esperanto, kiu realigis alian revon multjaran: mi vizitis mian unuan kongreson en Hago. Depost tiam kiom da geamikoj! La mondo fariĝis malgranda kaj pli granda mia deziro elkoni ĝin! Kaj por mi, "bakita" esperantisto, mondo signifas homojn, kun malsamaj vestaĵoj, malsamaj lingvoj kaj kutimoj, sed kun sama koro kiel la mia, kiu ege ŝatas koni homojn.

Bondeziroj el la tuta mondo!

Ni esperas, ke tiuj ĉi bondeziroj al la legantoj de "Komencanto", ricevitaj de elstaraj esperantistoj el la tuta mondo, entuziasmigis vin plue evoluigi vian lingvokonon de Esperanto kaj samtempe partopreni en la evoluigo de nia lingvo, tradukante kaj verkante en ĝi.

Renato Corsetti (Italio) Prezidanto de UEA

Karaj legantoj de "Komencanto", mi devas supozi, ke vi estas komencantoj, kvankam mi pensas, ke pluraj el vi estas komencintoj.

Esperantisto, kiun mi multe estimis, diris foje ke la vera problemo de Esperantujo ne estas la ekzisto de tro da eternaj komencantoj sed la malekzisto de tro da komencantoj.

La forto de grandaj lingvoj, iam la franca, nun la angla, morgaŭ la ĉina, kuŝas en tio, ke ili havas amasegon da eternaj komencantoj. Ĉiuj vendistoj en Romo, kiuj provas vendi al turistoj, konas la numerojn kaj kelkajn aliajn esprimojn en la angla. La samo okazas tra la mondo.

Ĉi tiu komenca babilado celis nur diri al vi kiom estas gravaj komencantoj, alivorte vi. Vi estas gravaj ankaŭ pro via novula entuziasmo. Vi havas ankoraŭ entuziasmon voli koni Esperantujojn, legi nian literaturon, debati pri tio, ĉu oni devas diri "la pordo estas fermata" aŭ "la pordo estas fermita". Unuvorte vi estas la vivanta sango de nia komunumo.

Pro tio mi ŝatas vin (kaj malŝatas la veteranojn kiel min - sed bonvolu ne diri al ili).

Pro tio mi sendas al vi multajn bondezirojn okaze de la nova jaro.

Amike, Renato Corsetti


Osmo Buller (Nederlando) Ĝenerala direktoro de UEA

Mi kore salutas vin komence de la nova jaro kaj nova jarkolekto de "Komencanto"! Mi esperas, ke ankaŭ en tiu ĉi jaro "Komencanto" gajnos novajn abonantojn kaj ĝia enhavo daŭre estos same interesa kaj vigla kiel antaŭe.

Legado estas bonega maniero por plibonigi kaj konservi sian lingvoscion. Legi tutan libron povas ŝtigi multajn komencantojn, sed legi

mallongajn tekstojn estas al ili pli agrable. Multaj tekstoj en "Komencanto" estas ne nur facilaj, sed ili estas ankaŭ klerigaj. Mi mem, kiu eble ne plu estas komencanto, legas kun granda plezuro la artikolojn, en kiuj konataj movadanoj rakontas, kiel ili fariĝis esperantistoj. Mi scias tion jam de longe, sed tamen mi ĉiufoje surpriziĝas pri tio, kiel interesaj homoj estas esperantistoj!

*Plezuran legadon al ĉiuj!
Osmo Buller*



Barbara Pietrzak (Pollando)

Estro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio

En la nova jaro 2006 al ĉiuj komencantoj kuraĝon kaj entuziasmon en la profundigado de la lingvokono kaj flugilhavan inspiron suriri la respondecan, sed ja riĉigan kaj emociigan vojon de komencanta aŭtoro.

Al la redaktoroj de "Komencanto" dankon pro tiu ĉi unika forumo por ambaŭ grupoj de komencantoj kun la espero, ke ilia revuo daŭre rolos kiel pordo helpanta al ĉiam pli multaj esperantistoj transiri la komencosojlon.

Plej kore deziras, Barbara Pietrzak

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)

E-verkisto, poeto, bardo

Por "Komencanto" kaj komencantoj mi tutkore deziras bonŝancon en ajna vivkolizio, sanon, feliĉon kaj prosperon.

Bonfartegu! Amike, Brunŝtono

Boris Kolker, (Usono)

Membro de la Akademio de Esperanto,
aŭtoro de "Vojaĝo en Esperanto-lando"

Mi deziras al la legantoj de "Komencanto" rapidan progreson por fariĝi komencintoj kaj poste - spertuloj.

Boris Kolker

Sylla Chaves (Brazilo)

poeto, verkisto, tradukisto

Al la karegaj gelegantoj de la revuo "Komencanto", de ilia fora amiko Sylla Chaves.

Deziras al vi ĉi kanto
feliĉon tra l' nova jaro,
sukceson por Esperanto
kaj pacon por la homaro.

Kore via, Sylla,

**Paul Gubbins (Britio)**

verkisto, dramaturgo, redaktoro
de "La Brita Esperantisto"

Al la legantoj de "Komencanto":

En mondo trude kunigata de komerca imperiismo, saintempe krude disigata de religioj kaj politikaj ideologioj, nepras la neŭtrala, racia kaj funde humanisma voĉo de Esperanto. Ni do ĝin aŭdigu konvinke kaj klare en 2006.

Paul Gubbins (Britujo)

Anatolij Ionesov (Uzbekistano)

fondinto kaj direktoro de Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando

Estimataj kolegoj-komencantoj!

Bonege, ke de jam de kelkaj jaroj ekzistas "Komencanto", revuo, sur kies paĝoj ĉiuj komencantoj de la mondo po-

vas senti sin hejme. Ni devas fieri (kial ne?), ke ni estas komencantoj, ja ĉio surtere (kaj supozeble ankaŭ ekstere!) startas de la komenco, sen komenco estus nenio, ĝuste komenco impulsas la vivon kaj ĉion ceteran. Sed, laŭ mi, vera komencanto povas esti konsiderata nur tiu, kiu konstante perfektigas sin intelekte kaj spirite, alproprigante novajn konojn pri diversaj fakoj, polurante sian parolkapablon kaj verkstilon, evoluigante sian kreivan potencialon ktp.

Tute ne hazardas la saĝa popola diraĵo "Komenco bona - laboro duona". Do, multajn bonajn, agrablajn kaj fruktodonajn komencojn al vi en 2006 kaj, nature, ankaŭ en postaj jaroj!

Komencante via, Anatoli Ionesov

Baldur Ragnarsson (Islando)

Verkisto, tradukisto, membro de Akademio de Esperanto

Estimataj samideanoj, jam nova jaro. La 119-a jaro en la historio de Esperanto. Aŭ prefere: en la vivo de Esperanto. Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo. Ĝi vivas en la mensoj kaj la agoj de la esperantistoj. Ĝi vivas en la potencialoj, de sia strukturo. Ĝi vivas en la egalrajteco, kiun garantias ĝia neŭtraleco. Sian vivecon ĝi ŝuldas al sia iniciatinto, L.L. Zamenhof, kiu havis la intuicion doni spiriton

al la lingvo, taŭgan por porti ĝin pluen al ĉiam pli fekunda vivo. Esperanto estas lingvo de liberigo kaj tiun liberigon ĝi transdonas al ni, kiuj amas tiun lingvon, ĝin uzas kaj per ĝi kreas serve al demokrateca interkomunikado. Mi deziras al la legantoj de "Komencanto" prosperan novan jaron kaj abundon de ĝojigaj momentoj.

Baldur Ragnarsson,

Roman Dobrzynski (Pollando)

ĵurnalistoj, aŭtoro de la libro "La Zamenhof-strato"

Karaj ĝiuspecaj komencantoj! Mi bondeziras al vi per fragmento de la poemo de la Nobelprimito *Wisława Szymborska*. Ĝia originala pola titolo estas "Nenio dufoje okazas". Mi tradukis ĝin sub la titolo:

La eterna komenco

Ĉio fluas, ĉiam, ĉie,
Sen komenco kaj senfino.
Ni naskiĝas senkonscie
Kaj forpasas sen rutino.

Sanon kaj sukcesojn!

Roman

Michel Duc Goninaz (Francio)

Membro de Akademio de Esperanto,
Direktoro de Franca E-Instituto

Karaj,

al la redaktantoj, kunlaborantoj kaj legantoj de "Komencanto" mi sendas plej sincerajn bondezirojn por la jaro 2006. Mi esperas, ke via tre utila revuo plu prosperos kaj plenumos sian celon progresigi la lernantojn de nia lingvo kaj diskonigi la verkojn de novaj aŭtoroj. Neniu devas esti "eterna komencanto", sed ni ja ĉiuj estas konstantaj lernantoj.

Michel Duc Goninaz

Vladimir Samodaj (Rusio)

Honora Membro de UEA,
redaktoro de "Scienco kaj Kulturo"

Estimataj legantoj,

mi, esperantisto kun 48-jara sperto, deziras al vi neniam cedi al tiuj personoj, kiuj eble penas konvinki vin pri malutilo de Esperanto, pri stulta perdo de tempo, kiun vi elspezas por ĝia lernado. Tiu lingvo estis kreita, por ke homoj de diversaj nacioj havu rimedon de bona interkompreno, paco kaj amikeco, do ĝia utilo por la homaro estas senduba, ĉar ĝi brile funkcias kaj efike servas la destinitajn por ĝi celojn.

Por bone posedi la lingvon ne forgesu multege legi en ĝi kaj krei proprajn verkojn - ĉu prozajn, ĉu poeziajn, ĉu sciencajn - tiamaniere vi partoprenos pluan evoluigon de nia mirinda interkomprenilo. Ne forgesu ankaŭ multe uzi la lingvon parole, partopreni diversaj E-arangojn lokajn kaj internaciajn.

Sami kaj prosperu ĉiam kaj en ĉio!

Vladimir Samodaj

Pri vetero, hundoj kaj poezio...

Vi verŝajne estas mirigitaj, karaj legantoj, kiel ĉi ĉi (tralegita supre) povas esti interligita.

Eble vi jam scias, ke tiu ĉi jaro laŭ orienta kalendaro estas Jaro de Hundo. Multaj popoloj havas siajn naciajn proverbojn kaj dirajojn, ligitajn al hundoj. Ekzemple, en Rusio frazo "hunda vetero" signifas veteron tiom aĉan, ke bona majstro nek mem eniras surstraten, nek ellasas la hundon el la hejmo. Ĝuste ĉi jare, kiam multaj rusianoj travivis eksternorme malvarman vintron, oni ŝercis, ke "hunda jaro venis kun hunda vetero".

Estas interese kaj amuze ekscii, ke en mezepoka Japanio esprimo "hunda vetero" signifis surterigon de la unua neĝo. En tiun tagon, kiam falis la unua neĝo, la Imperiestro gratulis ĉiujn korteganojn okaze de tiu evento kaj dissendis invitilojn al poetoj partopreni la

Imperiestran Poezian Turniron. Apud la imperiestra palaco speciale por tio ekzistis kampeto, kien neniu rajtis surpaŝi. En la tago, kiam falis la unua neĝo, oni enlasis en la kampeton du hundojn, kiuj kuris kaj petolis tie, lasante spurojn de siaj piedoj sur la neĝa ebenaĵo. Post iom da tempo servistoj vokis la hundojn kaj forkondukis ilin, kaj poste sur la kampeton eniris la imperiestro kun sekvantaj lin poetoj, kiuj komencis filozofie trakti la hundajn spurojn sur la neĝo, jen rektajn kiel sagoj, jen zigzagajn kiel ofte estas homa vivo, jen interplektitajn en neimageblajn kombinaĵojn. Konforme de tiuj spuroj poetoj verkis siajn filozofiajn poeziaĵojn kaj ĝuigis la publikon.

Karaj legantoj! Ni ne invitas vin al *poezia turniro*, sed instigas vin provi pli kuraĝe kaj aktive verki ĉi-jare aŭ poeziaĵojn, aŭ prozaĵojn kaj ĝuigi nin ĉiujn!

redakcianoj de "K"

Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]



Leksina Ludmila [Sudĵa, Rusio]

Nigra makuleto

Mia hundino Barboska estis fama pro tio, ke ŝi povis bone demonstri furiozon. Tial ŝiajn hundidojn oni volonte disprenis. Mia najbarino, maljunulino, ĉiujare prenis hundidojn. Por si mem, por la filinoj, por la nepinoj...

Foje la najbarino denove venis por preni hundidon. Kune kun ŝi venis lernanto de la veterinara lernejo.

La juna kompetentulo aŭtoritate diris, ke bona garda hundo devas havi en buŝo almenaŭ unu nigran makuleton. Kaj li provis malfermi la buŝon de la hundido.

Senrezulte! La indignita hundido furioze kontraŭstaris, mordis kaj bojegis. Finfine oni forportis lin sen kontrolo.

Post tio mi pensis kaj vokis: "Barboska! Iru al mi! Malfermu la buŝon!" Malantaŭ hundaj dentoj brilis absoluta nigreco.

"Ho, Barboska! Vi estas en plena ordo!", - jubilis mi.

Esperantigis **Tatjana Vŝivceva**
[Miass, Rusio]

Pasero

Mi iris hejmen laŭ ĝardena aleo post ĉasado. Mia hundo kuris antaŭ mi.

Subite la hundo malgrand-igis la paŝojn kaj komencis ŝtelrampi, kva-zaŭ flarsentis antaŭe iun ĉasobjekton.

Mi jetis rigardon tra la aleo kaj ekvidis paseridon, lanugkapan, kun flava rando ĉirkaŭ la beko. Ĝi elfalis el la nesto (vento forte skuis betulojn en la aleo) kaj sidis senmova, senhelpe etendanta apenaŭ kreskintajn flugilojn.

Mia hundo malrapide proksimiĝadis al ĝi, kiam desur najbara arbo abrupte falis antaŭ la hunda muzelo maljuna nigrabrusta pasero, kaj — hirtiginta, furioza, kun aŭdaca kaj samtempe povra kviko — saltis dufoje apud la dentoza malfermita buŝego. Ĝi aspiris savi, ĝi ŝirmadis per la propra korpo sian idon... sed la tuta ĝia malgranda

korpeto tremis pro hororo, ĝia voĉeto sonis raŭke, ĝi rigidigis, ĝi oferis sin!

Kia grandega monstro ŝajnis la hundo al la pasero! Sed, tamen, tiu ĉi pasero ne restis sur alta sekura branĉo... La forto pli potenca, ol singardo jetis ĝin desur la branĉo.

Mia Trezor haltis, retirigis... Lin vere impresis tiu ĉi potenco.

Mi hastis voki la konsternitan hundon kaj foriris kun admiro.

Jes, ne ridu, mi admiris tiun ĉi etan kuraĝan birdon, ĝian proaman impeton.

La amo, meditis mi, estas pli potenca, ol la morto, ol la timo morti. Nur en ĝi, en la amo realiĝas kaj daŭras la vivo.




Galina Vŝivceva [Miass, Rusio]

Pyhälä Raita [Lestijärvi Finnlando]

Ĉe la manĝujo de birdoj

Kiam alvenas aŭtuno, multaj homoj ekmanĝigas birdojn, ĉar estas amuze rigardi tra hejma fenestro, kiel birdoamiketoj kondutas. En iu tago alflugas aro da bombiciloj. Ili vikle kaj rapide esploras, kion manĝeblan disponigas la homoj. Se pretveturas biciklo aŭ aŭto, ili kaŝas sin en la heĝo aŭ suprenflugas al la pintoj de foliarboj. Ili ne longe restas ĉe la manĝujo. Ili serĉas precipe sorpoberojn kaj iras de unu regiono al alia.

Venas sciuro. Ankaŭ ĝi ŝategas la sunflorsemojn. Ĝi fortimigas la birdojn kaj sola malplenigas la manĝujon. La sekvan tagon ĝi ne atingas ĝin. Strange! Ĝi klopodas multmaniere. Fine ĝi pendigas sin per sia vosto de la branĉo super la manĝujo. Tio estas amuza, ĉar ĝi aspektas kiel renversita J-litero. Per siaj lertaj piedetoj ĝi provas atingi la manĝujon, sed falas surteren. Kia konsterniĝo! Ĝi kuras denove al la arbo, grimpas sur la branĉon, pendigas sin - kaj falas. Konsterniĝo ankoraŭ pli granda kaj kolero! Ĝi ne povas kompreni, kial ĝi ne sukcesas fari la samon kiel hieraŭ.



Rea kuro al la arbo, grimpado, pendigo kaj falo. Nur ni, la rigardantoj, scias, ke la manĝujo antaŭe pendis pli proksime al la branĉo

la sciuro pendigas sin. Ni ne volis, ke ĝi sola voru ĉiujn sunflorsemojn.


Nokte venas leporo sub la arbon. Ni vidas ĝin en la lunlumo aŭ en la matena krepusko. Ĝi trovas falintaĵojn, avenon, semojn. Malsatega, ĝi mordas la pajlon de jam sengrajnigita garbo, kuŝanta surneĝe. Poste ĝi saltkuras en la arbaron. La spuroj ŝajnas bluetaj, ĉar en ili kuŝas ĉiam ombro.

Garolo estas bela bunta birdo, sed ankaŭ ĝi fortimigas la malgrandajn birdojn. Ĝia voĉo estas malbela. Timigaj estas ankaŭ pigoj kaj pego, sed la suno admirinde brilas sur ilia nigrablanka plumaro. Kelkfoje ni trovas plumetojn sub la arbo. Tiam iĝas klare, ke la etajn manĝantojn atakis strigo aŭ falko. Foje ni trovis svenintan birdeton, kiu tamen reviviĝis, kiam ni lasis ĝin trankvila en ŝirmejo. Onidire kelkaj birdetoj estas tiom malsataj, ke ili ne plu vivos, se ili trovos la kutiman manĝujon malplena dum frostego.

Paruoj kaj emberizoj ŝatas manĝi dum sunleviĝo kaj sunsubiro. La vintra tago estas tre mallonga, en decembro nur 4-hora.

pufa formo plaĉas al la finna okulo. Ruĝa koloro mankas vintre. Pirolo estas kvazaŭ flameto de varma vivo. Ĝi ŝatas beki semojn de sur la neĝo. Printempe kaj aŭtune vizitadas la manĝejon aliaj specioj: nucifrago, kardelo, fringo kaj aliaj. Homoj konkuras pri la viditaj specioj kaj interparolas pri siaj observoj. Eĉ per telefono! "Ĉu vi vidis ke...? Ĉu vi vidis la ...on?" Iu provas allogi pli da specioj per pistitaj nuksoj kaj aliaj frandajoj.

Venas somero kaj la birdetoj enarbariĝas por nesti. Aŭtune ili reaperos, se ni sufiĉe frue disponigas al ili taŭgan manĝujon. La manĝigado helpas al ili elturniĝi dum la severa vintro.




Ili profitas de la lumo; por la nokto ili kaŝiĝas ie, kie ili povas intervarmigi unuj la aliajn, atendante mateniĝon. La nokto estas longega kaj terure malvarma. Iutage alflugas unu-tri piroloj. Ilia ruĝa ventro kaj

Dum tralego de kontribuajoj de ni aj legantoj, nin kaptis la ideo lanĉi rubrikon "Impreso", en kiu ni volonte publikigos ĉiujn provojn, verkitajn en formo de impreso, ekzemple de tralegita, aŭ de iu interesa vojaĝo, aŭ de konatiĝo kun interesa persono. Sube vi povas legi la unuajn tiajn verkojn.

AIDA Kiyoshi [Jokohamo, Japanio]

La libro "Zamenhof-Strato" kaj promenado laŭ la Strato



En 2003 mi kun mia edzino partoprenis en la 88-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en la urbo Gotenburgo, Svedio. Tiam okazis en la angulo de la librosevo la programero "Aŭtora Duon-horo", en kiu d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof prezentis noveldonitan libron "La Zamenhof-Strato". La libro estis eldonita en Esperanto en la stilo de interparolado inter Zaleski-Zamenhof, d-ro pri arkitekturo kaj Roman Dobrzynski, pola ĵurnalisto.

La unuan fojon mi vidis Zaleski-Zamenhof, nepon de Ludoviko Zamenhof, vizaĝo al vizaĝo. Post aŭskulto de lia parolo mi petis lin subskribi la libron, kiun mi ĵus aĉetis en la libroservo. Li volonte konsentis fari tion. Mi fotis lin kune kun mia edzino.

Mi apartenas al la 8-persona legkunsido, tiel nomata "Pado". Tiam ni preskaŭ finlegis la libron "Neniu Ajn Papilio", verkita de s-ro Trevor

Steele. Ni decidis elekti la libron "La Zamenhof-Strato" kiel la sekvan libron por tralego. Tiutempe mi ricevis perrete alvokon de s-ro Kobayashi Tsukasa partopreni la tradukadon de la libro. Li estis la iniciatinto de la projekto. Rezulte 67 esperantistoj akceptis la alvokon. Ni tradukis 270 paĝojn de la libro en mallonga tempo, dum ĉirkaŭ du monatoj, ne renkontante unu la alian, sed uzante nur interreton.

La tradukadon aperigis libroforme en januaro 2005 la eldonejo Hara Shoboo en Tokio. Kelkaj japanaj ĵurnaloj kaj semajnaj gazetoj favore raportis pri la japana versio de la libro. Ĝi estis elektita kiel rekomendinda libro por bibliotekoj.

Nun la libro aperis en aliaj kelkaj lingvoj, t.e. la litova, la pola, la kroata, la ĉeĥa kaj plu.

Kvankam mi tradukis nur kelkajn paĝojn de la originalo, mi havis, dank'al la libro, valoran sperton ekkoni la fonon de historioj de poloj kaj judoj. Min impresis la ĵurnalista lerteco de s-ro Dobrzynski konduki al la enhavoriĉa interparolado, uzante multe da materialoj, kaj vasta scikono de d-ro Zaleski-Zamenhof.


En la libro d-ro Zaleski-Zamenhof rakontis detale pri la interna vivo de la getto kaj ankaŭ pri la transŝarĝa placo, ŝarĝterminalo de fervojo, de kie multe da judoj estis transportitaj al ekstermejo. Pasintjare mi kaj mia edzino havis la ŝancon viziti la ekstermejon Auschwitz. Tie ni vidis multajn mizerajn ekspoziciaĵojn de mortigitaj judoj. En majo 2005 ni partoprenis en neesperantista karavano organizita de turisma agentejo.

Ni rondvojaĝis en Pollando dum

12 tagoj. Nia unua celo estis vidi propraokule la naskiĝlandon de L.L. Zamenhof kaj la dua estis — renkontiĝi kun esperantistoj en la urboj, kiujn ni vizitis dum la vojaĝo. Ĉar ni ambaŭ (mi kaj mia edzino) entreprenis tradukadon de la libro "Zamenhof-Strato", ni deziris vidi tiun straton en Varsovio kaj promeni laŭ ĝi.

En Varsovio ni renkontiĝis kun s-ino Barbara Pietrzak, estro de la E-Redakcio de Pola Radio kaj vizitis ŝian laborejon, kie ni estis prezentitaj al ŝiaj junaj kolegoj. Ni ofte aŭdis iliajn voĉojn en radioelsendoj, kaj pro tio la renkonto plaĉis al ni. Poste ni estis kondukitaj al la laborloko de s-ino Barbara kaj neatendite intervjuitaj de ŝi antaŭ mikrofono. Post la intervjuo s-ino Barbara akompanis nin al la Zamenhofa strato. Ni promenis laŭ la strato iom da tempo kaj staris antaŭ la domo ĉe la angulo de la strato, kie la kreinto de nia lingvo loĝis. Inter du kadritaj fenestroj troviĝis eta tabulo sur la muro, sur kiu estis gravurita mallonga klarigo en du lingvoj, la pola kaj Esperanto. Mi rememoris la duplikatan foton en la libro "La Zamenhof-Strato". Sur la tabulo ni legis: "Tie ĉi staris DOMO, en kiu en la jaroj 1898~1915 vivis kaj laboris D-RO LUDOVIKO ZAMENHOF kreinto de la lingvo Esperanto. La tabulon oni enmurigis en la centjara datreveno de lia naskiĝo. Varsovio 1959."

Tiu ĉi domo ne aspektas tre ĉarma por ordinara pasantoj. Starante apud ĝi mi pensis: kiom da homoj, escepte de esperantistoj, volonte venos ĉi tien kaj meditos pri la ideo de d-ro Zamenhof?



fotoj de Aida Kiyoshi

Supozeble, ke tiu ĉi originala verko aperis sub influo de impreso de tralegita materialo pri hajko-poemoj, kiu estis publikigita en la antaŭa numero de "K".

Kurita Kimiaki [Miŝima, Japanio]

Hajkoj

Membroj de Miŝima Esperanto-Klubo de tempo al tempo forgesas lerni Esperanton, estante absorbataj de amika babilado. Jen kiel ili interparolas:

S-ro A: Hieraŭ mi trovis interesan poemon en ĵurnala kolumno. Jen!

Papilieto
transflugis tute sola
Tatar-Markolon

Ĝi estis verkita de Anzai Fujue en 1926.

S-ro B: Ĉu ĝi estas poemo?

S-ro A: Laŭ la prezento, ĝi estas hajksimila poemo, siatempe rigardata kiel reprezentajo de modernisma poemo japana. Tradicie japanoj tre ŝatas ekstreme kompakajn poeziajn.

S-ro B: Kaj, kio estas "Tatar-markolo"?

S-ino C: Ĵus mi trovis en mia elektronika vortaro la nomon "Tatar-markolo". Ĝi estas markolo inter la insulo Saĥalino kaj Azia Kontinento, ĉirkaŭ 560 kilometrojn longa kaj de 8 ĝis 129 kilometrojn larĝa. Ĝi konektas la Japanan Maron sude kun la Oĥotska Maro norde.

S-ro B: Jaro 1926 estis la jaro, kiam en Japanio komencis domini militarismo. Des pli impresas tio, ke la poemo pritraktas malgrandan papilion.

S-ro A: En la ĵurnalo mi trovis ankaŭ alian poemon:

"Jen papilio!"
Krie jubilis ĥore
soldatoj rusaj

Ĝi estis hajko verkita de Cuĵi Ĵukio kaj publikigita en 1926. Estas interese, ke naskiĝis kvazaŭ dua strofo de la supre citita.

S-ino C: Figuro de soldato tute malakordas kun papilio. Sed aŭdinte tiun hajkon, mi rememoris la finalon de la kinofilm "En okcidento nenio nova", kiu majstre ilustras kiom kontraŭhumana estas milito. En la fina juna soldato, trovinte papilion en tranĉeo, etendis la manon, kaj ĝuste tiumomente lin trafis mortiga kuglo.

S-ro A: La sama aŭtoro, Cuĵi Ĵukio, verkis jenan hajkon:

Ja plena luno
ankoraŭ postsekvas min
maljuniĝintan

La aŭtoro suferis pro tre malofta kaj serioza mjela malsano, kiu kripligis lin. Tri monatojn post la publikigo de tiu ĉi hajko en ĉi hajka rondo, li mortis. Ĝis morto li havis puran infanan koron, kian budhisma filozofio alte taksas.

S-ro A: Jen la sekva hajko, kiun traduki ŝajnas ege malfacile. Hajko de Kubota Mantaroo:

Lernintaj kune
A B C Ĉ ĉiuj ve
disiĝis jam for

S-ro B: Mi vidas, ke en tiu ĉi hajko "A B C Ĉ" ludas jen la rolon de ritma vorto, kiu elvokas sekvan vorton "ĉiuj", jen la rolon de sugestaĵo de tio, kion ili lernis.

S-ino C: Hajko ne havas rigoran metrikon, sed ĉiu hajko havas sian propran ritmon, kio faras ĝin ege kara. Ĝi malstreĉigas nin.

S-ro A: Do, aŭskultu alian malstreĉigan hajkon de sama aŭtoro:


Horloĝvendejo
Kiu horloĝo ĝustas?
Printempa vesper'

S-ino C: En Japanio printempo alportas nebletan atmosferon kaj homoj fariĝas dormemaj. La sceno devas esti en printempa vespero.

S-ro B: Mi memoras antaŭelektronikan tempon, kiam horloĝoj en vendejoj laŭplaĉe montris horojn kaj neniu plendis pro tio. Siatempe homoj havis alian filozofion ol nun. Modernigo ne signifas ĉion.

S-ro A: Ni havu ripozeton kaj poste ni komencu la lernadon de Esperanto!

Verkinto kaj tradukinto de hajkoj Kurita Kimiaki



fragmento de bildo de
Kornĵhina Anna [Barnaul, Rusio]

Ni daŭrigas publikigi serion de originalaj materialoj, kiuj povas helpi plibonigi sciojn pri Esperanto-gramatiko. *Speciale por ĉi-jare aliĝintaj legantoj de "K" ni ripetas la aŭtoran enkondukon, publikigitan en "K"-2005-6.*


Johan¹-Luko Tortel [Le Belvedere, Francio]

Proverboj por komencantoj

Ĉu ni, komencantoj, scias, kio estas proverbo? Zamenhof diris: "Popol-diro" en sia Dua Libro de l' lingvo internacia. "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" klarigas: Popola maksimumo (ver-aĵo pri la vivo).

La patro de Zamenhof, Marko, verkis libron de proverboj. Ludoviko tradukis ilin en Esperanton. Ĝi nom-iĝas: "La Proverbaro", kaj entenas preskaŭ tri mil proverbojn. Proverbo ofte diras banalajon. Sed ĝia intereso kuŝas en ĝia sprita maniero paroli. En Esperanto tiu lerta parol-maniero estas grava, ĉar ĝi prezentas pretajn esprimojn por multaj okazoj de la vivo ĉiu-taga. Tiaj vort-arangoj ofte mankas al ni, kiam ni volas diri viglan frazeton. Ŝajnas, kvazaŭ nia Esperanto ne havus trafajn, rapidajn, densajn dirojn. Ne, ili jam ekzistas en nia Proverbaro!

Ni do kune legu kelkajn el tiuj popol-diroj; ni tiel "trafos du celojn per unu ŝtono": ni lernos pretajn eldirojn kaj distre re-vizitos nian gramatikon (regul-aro por ĝuste uzi nian lingvon). Ek !



Saluton, amikoj de "Komencanto"! Jen kelkaj novaj proverboj:

Amiko de amiko estas ankaŭ amiko

(73) (Amiko de "Komencanto" estas ankaŭ amiko, ĉu ne) ?

Ĉi tie **estas** signifas *egalas*, kaj ne plu: *troviĝas*.

Kiso antaŭ amaso estas kiso de Judaso

(956) (Evangelia aludo, evidente).

Pri kio oni parolas? Pri kio temas? Pri kiso. En la antaŭa (73), pri kiu temis? Pri kiu oni parolis? Pri amiko. Do, kiso, amiko, estas la subjektoj.

Subjekto de-venas de latina vorto kun la senco meti sub... sub kion? Sub nian rakontan ideon. Subjekto estas la bazo, la de-ir-punkto de nia ideo en nia diro.

Subjekto ofte aperas kun fina -o. Do subjekto ofte estas nomo. Sed ne ĉiam, ekzemple, ĝi povas esti pronomo:

Kio en la kapo, tio sur la lango

(907) (Pri persono, kiu ne scias gardi sekreton!)

Kio kaj **tio** estas pronomoj (pro-nomo, el la latina: por nomo, loko de nomo).

Krome, malaperis la verbo *estas*! Ĝi tamen ekzistas, sed kaŝita! Oni diras: sub-kompre-nita. La kompleta frazo estus: *Kio estas en la kapo, tio estas sur la lango*. Por pli-vigl-igi la frazon, oni de-metas *estas*.

Kial la kapo, la lango ? Oni povus ne uzi **la**, sed ĝi insistas: *tiu nia...* **La** estas artikolo (el latina vorto, kiu signifis parteto). Por bone uzi ĝin, ni konsideru, ke ĝi estas frateto de la bone konata vorto **tiu**.

Kapo, lango havas finaĵon "-o", ĉu do ili estas subjektoj? Amaso, Judaso, eĉ la dua amiko ankaŭ havas -o. Ĉu ankaŭ ili do estas subjektoj?

Tamen ne, ĉar **en** kaj **sur** venas antaŭ ili, lig-iĝas al ili, por fari blokon: en-la-kapo, sur-la-lango. Same en (956) estas blokoj: antaŭ-amaso, de-Judas.

Jen pruvo de tia bloko: oni povas fari unu vorton el ĝi: Kiso *antaŭamasa* estas kiso *Judasa*; kio *enkapa*, tio *surlanga*. Pro tio, ke vorto kiel **en** kaj **sur** nepre staras ĝuste antaŭ alia vorto, kun kiu ĝi lig-iĝas, oni nomas ĝin: prepozicio (latine antaŭ-loko).

La bloko *En la kapo* komplet-igas **kion**, kaj *sur la lango* komplet-igas **tion**. Same *antaŭ amaso* kaj *de Judaso* komplet-igas **kison**.

Ĉar la blokoj komplet-igas la subjektojn, oni nomas ilin komplementoj (el latina vorto: komplet-ilo). Komplementoj klar-igas, preciz-igas la subjektojn.

Sed je kio utilas klar-vid-eble apart-igi subjekton dis-de komplemento? Multaj lingvoj ne faras tion, kaj kontent-iĝas per distingo tra la senco de la vortoj. Male, Esperanto montras tiun diferencon jam sur la vesto de la vortoj aŭ per ilia arango mem. La t-i-al-o venas de Zamenhof. Kiam li kreis Esperanton, lin turmentis la ideo (tiu ideo!), ke oni povus riproĉi al ĝi dubajn sencojn, ne-klar-econ, erar-obl-ecojn, ne-preciz-econ, kaj sekve konkludi, ke lia invento valoras nenion. En la (en tiu!) venonta "Komencanto" ni vidos per-proverban ekzemplon de la (de tiu!) necesa distingo. Ĝis!



En Esperanto ĉiu demando devas komenciĝi per iu demanda vorto, ekzemple: “kiu”, “kio”, “kien”... aŭ per “ĉu”: *Kiu faris tion? Ĉu vi komprenas?* Oni ne povas diri: *Vi komprenas?* Same estas pri nerektaj demandoj: *Mi ne scias, ĉu vi komprenas. Li demandis, ĉu mi havas tempon.*

Oni uzas **ĉu** ... **ĉu** por esprimi alternativon kun nuanco de dubo, de necerteco aŭ indiferenteco:

El ĉiu ajn infano oni povas fari ĉu kristanon aŭ hudaiston ktp, ĉu francan, germanan aŭ japanan patrioton (el “Leteroj de Lanti”).

Aŭ havas du sencojn: 1) alivorte: *Praha aŭ Prago estas la ĉefurbo de Ĉeĥio.* 2) Unu el ili: *Ĉu vi deziras teon aŭ kafon? Vespere mi legos aŭ skribos al amikoj.*

Per **aŭ... aŭ** oni esprimas alternativon, do elekton el inter du aŭ pluraj statoj aŭ agoj: *Vespere mi aŭ legos aŭ skribos. Unu el ni devos cedi, aŭ mi aŭ vi.*

Kelkaj erare uzas en tiu ĉi okazo **ĉu... ĉu**: *Unu el ni devos cedi, ĉu mi ĉu vi. Ĉu estas ja demanda vorto kaj estas uzbla nur ĉe demandoj, rektaj kaj nerektaj:*

Ĉu Praha estas hela? Kiu urbo estas pli bela, ĉu Praha aŭ Bodapeŝt?

Sed en la frazo *Unu el ni devas cedi, ĉu mi aŭ ĉu vi* ne troviĝas ja demando, kaj tial ĉu tie ne estas uzbla. En siaj “Llingvaj Respondoj” Zamenhof atentigis pri la eraroj, kiujn oni faras inter tiuj vortetoj: “... la vorton **ĉu** ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo... sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezone anstataŭ **jen**, **aŭ** ktp... la frazoj, *Ŝi kutimas havi ĉe sia zono, ĉu rozon, ĉu diamanton kaj Diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto etas ne tre bonaj, en la unua okazo mi preferus jen, en la dua aŭ.* (L.L.Zamenhof “Llingvaj Respondoj”).

Jen laŭtema kaj amuza poemo, kiun vi povas facile parkerigi. Ĝin tradukis el la portugala speciale por komencantoj vaste konata E-verkisto Sylla Chaves kaj afable sendis al la redakcio.

Cechlia Meireles
Esperantigis Sylla Chaves [Rio de Janeiro, Brazilo]

Aŭ tio aŭ ĉi tio

Aŭ la suno brilas kaj ne falas pluvo,
aŭ la pluvo falas kaj ne brilas sun?
Ringon mi ne metas, se mi metas ganton.
Kiun el la du mi elektos nun?

Se mi grimpas supren, mi ne restas sube.
Mi ne povas grimpi kaj surtere resti!
Estas ja domaĝe, ke mi ne sukcesas
en la sama tempo en du lokoj esti!

Ĉu mi gardas monon kaj ne manĝas kukon,
aŭ aĉetas kukon kaj ne gardas monon?
Dum la tuta tago devas mi elekti!
Kio al mi donas la pli grandan bonon?

Ĉu mi devas ludi, aŭ mi devas studi?
Kuri aŭ sidiĝi? Kion fari? Kion?
Kial la decidoj estas malfacilaj?
Kion mi elektos: tion aŭ ĉi tion?

Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



Esperantigis **Beliousov Igorj** [Engels, Rusio]

Pri politikistoj kaj hundoj

Per kio similas politikistoj kaj hundoj

Kaj politikistoj, kaj hundoj bone konas sian mastron.

*

Kaj politikistoj, kaj hundoj ŝatas amasiĝi kaj superlaŭdi siajn gvidantojn.

*

Ili ĉiam sinĵetas al la fremduloj.

*

Kaj politikistoj, kaj hundoj emas furioze defendi sian "osteton".

*

Kaj politikistoj, kaj hundoj amas boji, sendepende de motivo.

*

Ju pli eta estas la politikisto, des pli akute li bojas.

Per kio diferencas
politikistoj kaj
hundoj

Politikistoj, diference de hundoj, ne taŭgas por farado de iu ajn laboro.

*

Al la hundo oni povas fidi gardadon de valoraĵoj, sed al politikisto – neniam.

*

Neniu diros, ke politikisto estas amiko de homo.

Pri la hundoj

dediĉe al la Jaro de Hundo
kolektis la redakcio

La hundoj scipovas rideti, sed ili ridetas per vosto.

M. Isman

Se hundoj scius paroli, ili ne aspektus tiom saĝaj.

S. Savvatjev

Se trovi malsatan senhejman hundon kaj manĝigi tiun ĝisate, ĝi ne mordos vin. En tio estas principa diferenco inter hundo kaj homo.

M. Tven

Mankas hundo – ekhavu amikon.

N.N.

Akiru hundon! Tio estas sola maniero aĉeti amon kontraŭ mono!

J. Prohorovskaja

Ni amas la hundojn ankaŭ pro tio, ke ili ne strebas iĝi niaj majstroj.

G. Malkin

Honesta homo povas senti honton eĉ antaŭ hundo.

A. Ĉeĥov

Ju pli mi ekkonas homojn, des pli mi ŝatas hundojn.

M. de Sevinje

Ne tiom hundoj servas al homoj, kiom homoj – al hundoj.

M. Montel


Kato estas plena de mistero, kiel besto; hundo estas simpla kaj nava, kiel homo.

K. Ĉapek

Hunda vivo – kiam vi ne povas permesi al vi havi hundon.

NN

Loŝkina Nadejda [Glazov, Rusio]



Tatjana Vŝivceva [Miass, Rusio]

Neelpensita histotio

Somero. Fervoja stacidomo. Longa vico de homoj ĉe bileta kaso. Var-mego. La vico ŝvitas, svarmas, ner-voziĝas. Subite alkuras hirta, ekscitita virino kaj tremvoĉe petas la homojn ĉe la kaso:

— Permesu al mi aĉeti bileton por hundo! Nia trajno tuj startos, sed oni ne enlasas nin en la vagonon!

La homoj plene ignoras ŝin. Ŝi mal-trankviliĝas, kuretas ĉe la kaso:

— Nur unu hundan bileton! Bonvolu permesi...

Unu viro replikas:

— Kaj kial vi jelpas? BOJEGU !

Dialogoj pri hundoj

El diversaj fontoj kolektis kaj esperantigis
Nik. Saldin [Jekaterinburg, Rusio]



Kia speco?

Oni demandas posedanton de hundo:

— Kiu estas speco de via hundo?

— La polica hundo.

— Sed tute ne similas...

— Kaj ne devas simili. Ĝi servas en sekreta polico.



La unua loko

— Antaŭe nia hundo okupis la unuan lokon en la koro de mia edzino. Nun tiun lokon okupis mi.

— Kiel vi tion atingis?

— Vidu, la hundo iĝis tiom kaprica, ke ne plu volas manĝi tion, kion kuiras mia edzino. Sed mi manĝas!



Ne malkaŝu kartojn

Unu viro venas al sia konato gaste kaj vidas, ke tiu kartludas kun sia hundo.

— Ho, kiom saĝa hundo!!

— Saĝa, sed ne tre, - diras la majstro, - kiam al ĝi venas bonaj kartoj, ĝi svingas per vosto.



En bestobazaro

— Kiom kostas via hundo?

— Cent rublojn.

— Eble vi cedos kontraŭ duono?

— Mi ne vendas duonon de la hundo.

Ne nur bela

— Kiom bela estas via hundo, verŝajne, ankaŭ saĝa?

— Ho! Hieraŭ dum promenado mi diris al ĝi: "Ŝajnas, ke ni ion forgesis". Kiel vi pensas, kion ĝi faris?

— Kuris hejmen kaj alportis tion, ĉu ne?

— Ne.. Ĝi sidiĝis kaj skrapis post la orelo kaj komencis rememori, kion ni povis forgesi.



Superŝtelo

— Ĉu ni povas vidi la hundon, kiu hieraŭ gajnis la unuan lokon en la konkuro de gardohundoj?

— Bedaŭrinde, ne. Hieraŭ nokte oni forŝtelis ĝin.



Kion fari?

Nokto. La edzino vekias la edzon:

— Vekiĝu! Al ni penetras ŝtelistoj!

— Sed kion mi devas fari?

— Almenaŭ veku la hundon!



Honesta

— Tamen, honesteco estas bona afero, - diras unu skoto al la alia.

— Kial vi tiel pensas?

— Antaŭ kelkaj tagoj mi forŝtelis fremdan hundon kaj volis ĝin vendi, sed neniŭ donis kontraŭ ĝi eĉ 5 pundojn! Tiam mi redonis ĝin al la posedanto kaj tiu donis al mi 10 pundojn!

Rekompenco

— Min murdis via hundo! Mi postulas rekompenson!

— Bonvolu. Mi tenos la hundon, ka vi murdu ĝin!



Utila ĉashundo

— Mi aŭdis, ke vi ekposedis ĉashundon?

— Ho, tio estas mirinda hundo! Sen ĝi mi simple ne povus veturi al ĉasado.

— Sed kial mi ne vidas vin kun ĝi en arbaro?

— Kiu arbaro? Kiam mi veturas al ĉasado, la hundo restas hejme, aŭskultas babiladon de mia edzino, spektas kun ŝi televidon kaj vizitas vendejojn.



Estu atenta

Junulo sidas sur benko, sub kiu kuŝas grandega hundo. Al li proksimiĝas viro kaj demandas:

— Ĉu via hundo ne murdas?

— Mia? Ne!

La viro volas eksidi sur la benkon, sed lin akre murdas la hundo. La viro malice:

— Vi ja diris, ke via hundo ne murdas!

— Sed kiu al vi diris, ke tiu estas mia hundo?



Kaŝema hundo

Oni demandas la gardan hundon:

— Kial vi estas tiom malica?

— Mi ne estas malica, - respondas tiu, - mi estas bonkora, sed... mi tion kaŝas!

— Kial?

— Ĉar timas perdi la postenon



Esperantaj Aspirantoj

Mallongaj prezentoj de "aspirantoj":

La plej bela el ni estas **Olga**. Ŝi estas la artdirektorino de Aspiro; kantas kaj aŭdas ĉion, laŭ notoj kaj imporzive. Ŝia voĉo estas belega. Olga baldaŭ fariĝos poligloto - ŝi jam parolas la rusan, la ukrainan kaj la germanan, samtempe ŝi lernas la hispanan, la anglan kaj esperanton. Malindiferenta al dolĉaĵoj kaj hejmtaj bestoj. Tenere rilatas kun sia komputilo.

Olga Litvinova, naskiĝis en 1979, en Germanio ekde 2004, ĉe Aspiro artdirektorino kaj kantistino.

La plej saĝa el ni estas **Sergej**. Li neniam ludas la samon, la notoj signifas por li nenion, li ludas nur tion, kion li aŭdas. Sed li aŭdas multon. Antaŭ nelonge li finverkis sian trian libron pri la bardoj. Li verkas pri tio, kio venas en la kapon. De la alteco de sia aĝo li miregas pri la kreado de la bando "Aspiro" ne malpli ol aliaj ĝiaj membroj kaj iliaj familianoj.

Sergej Orlovskij, 1953, naskiĝis en Ukrainio, en Germanio ekde 2001, ĉe Aspiro ĉefgitaristo, kantisto kaj aŭtoro.

La plej organizita el ni - **Grigory**. Li eĉ ludas laŭ notoj, havas bonan koncertan gitaron sed, feliĉe, li ne kantas. Frue li estis pli konata kiel programisto kaj kreinto de la retejo "Pordego al Germanio" Antaŭ nelonge li fariĝis patro.

Grigory Grin, 1974, naskiĝis en Rusio, en Germanio ekde 1998, ĉe Aspiro organizanto kaj gitaristo.

(pliaj informoj pri "Aspiro" troveblas en la reto ĉe <http://aspiro.vorota.de>)



Antaŭnelonge redakcio de "Komentencanto" konatiĝis kun tre interesa persono, esperantisto el la germana urbo Nurenbergo Grigory Grin, kiu estas kreinto kaj motoro de nova kaj dume ne tre vaste konata muzika esperanto-bando "Aspiro". Ĉiuj muzikistoj de la bando estas eksrusianoj, kaj mem Grigory estis nia samurbano (sed tiam li ne estis esperantisto kaj ni ne estis konataj). Ni petis Grigory rakonti, kio estis en la komenco, kiel li iĝis esperantisto kaj kiel al li venis ideo praktike apliki sian konon de Esperanto kaj organizi tiun ĉi muzikan grupon. La redakcio dankas al Grigory, ke li trovis iom da tempo por respondi niajn demandojn.

K: Kiam kaj kiel vi renkontiĝis kun Esperanto?

G.G.: Kiel multaj aliaj mi delonge sciis, ke esperanto estas artefarita lingvo, kiu sukcese mortis, ne trovinte sufiĉe da subteno. En novembro 2004 mi retumis en Vikipedio – libera enciklopedio – la projekto, kiu fascinigis min dum 2004. En Vikipedio ĉiu artikolo povas ekzisti en multaj lingvoj. Hazarde mi ekvidis en iu artikolo ligan al ĝia esperanto-versio. Pro scivolo mi alklakis la ligan kaj ekvidis strangan lingvaĵon. Sekva klako – al la hejmpaĝo. Pro miro mi apenaŭ ne falis de mia seĝo: la esperanta Vikipedio havis pli ol 20.000 artikolojn! La rusa versio luktis tiam por atingi la limon de 10.000 artikoloj. Evidentiĝis: esperanto

ja ne mortis! Mi tuj serĉis en Guglo "esperanto" kaj ... la verda mondo englutis min. La plej unuaj impresoj: la lingvo, la movado, la literaturo, la arto - ĉio ĉi, ja, ekzistas! Tio estas sufiĉe mirinda fakto, kiu daŭre allogas min al esperanto, ankaŭ post la unua konatiĝo kun gramatiko.

K.: Kio okazis poste? Ĉu vi decidis lerni la internacian lingvon?

GG: Dum unuaj semajnoj post la renkonto kun esperanto mi multe legis pri ĝi. Mi trovis artikolojn kaj librojn pri esperanto, E-prozon kaj poezion. Ĉio ĉi estis interese, sed ne mirige. Sed nur kiam mi malkovris kantojn en esperanto, mi ekkredis, ke mi vidas vere vivantan lingvon. Mi elŝutis ĉion, kion mi trovis - de MusicExpress, Viniikosmo, esperanto.mv.ru kaj plulernis esperanton per aŭskultado. Mi ripete aŭskultis la samajn kantojn ĝis mia edzino finfine ne plu eltenis kaj malpermesis tion al mi.

K.: Oni multe parolas pri praktikebleco de Esperanto. Kiel vi difinas ĝin?

G.G.: Esperantujo bezonas konkretajn internaciajn projektojn, kiuj eble ne rekte koncernas la lingvon, tamen, kiel vere internaciaj, uzas esperanton kiel komunikilon. De tiaj projektoj, kiel ĝermoj, oni povas disvastigi la lingvon. Ekzemplo de tia projekto estas Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org>). >>>

Miaopinie, la esperanto-komunumo subtaksas la rolon de Vikipedio, samkiel la tuta mondo subtaksas esperanton. Se legantoj de "K" dezirus, mi povus rakonti – kial.

K.: Vi troviĝas inter tiuj malmultaj esperantistoj, kiuj kuraĝas tuj post ellerno de la lingvo praktike apliki ĝin en iu konkreta projekto. Bv iom rakonti pri tiu via sperto kaj pri ideo krei muzikan bandon "Aspiro".

G.G.: En aprilo 2005 mi, novbakita esperantisto, venis al gitaristo kaj bardo Sergej Orlovskij kun la ideo, ke tiu kantu bardajn kantojn ankaŭ en la internacia lingvo esperanto. Sergej (surprize) konsentis, sed nur kondiĉe, ke mi subtenos lin per gitarludo. Mi estis nur komencanta gitaristo, do, li ekinstruis al mi gitarludon, kaj mi al li - esperanton. Ambaŭ tiam eĉ imagi ne povis kiel ampleksa fariĝos la afero.

Ni komencis unuajn provojn en Nurenbergo, en julio ni jam estis invititaj al Munkeno kanti enkadre de BUGA (germana Ĝardenekspozicio) dum esperanto-tago, kiun samtempe partoprenis e-kantistoj JoMo el Tuluzo (Francio) kaj Ralph GLOMP el Hamburgo (Germanio). Post BUGA al nia duopo aliĝis Olga Litvinova, juna kantistino, kaj pliriĉigis ĝin per sia belega voĉo.

K: Kiam kaj kie estis prezentita via unua koncerta programo? Kiel aperis nomo de la bando - "Aspiro"?

G.G.: Tio okazis en oktobro 2005 en Erlangen enkadre de la interkultura monato en tiu germana urbo. La unuhora programo enhavis rusajn bardajn kantojn (tradukitajn esperanten) kaj originalajn kantojn en esperanto. En la barda bloko temis pri konataj kanzonoj de Bulat OKUĜAVA, Jurij VIZBOR kaj Oleg MITJAEV. Originalaj kantoj estis plejparte de Mikaelo BRONŝTEJN, ankaŭ de Ĵomart kaj Nataŝa, kaj Ekvinokso. Tre plaĉis al la publiko internacia kanto "La lama reĝo" de Aleksander DULOV. Ene de kantado mi iom rakontis pri la aŭtoroj, pri la kantoj kaj ilia historio. Post la koncerto ni, entuziasmigataj per varmega akcepto de publiko, komencis fari pluajn planojn kaj elektis por ni novan nomon: "Aspiro". Tio povus esti „oficiala“ naskiĝo de la bando.

K: Kiujn kantojn vi preferas kanti? Ĉu vi teksas proprajn kanzonojn?

G.G.: Ni komencis per la kantoj de la rusiaj aŭtoroj. Ni ja nun loĝas en Germanio kaj volas kapti la ŝancon konatigi la germanojn kun la heredaĵo de la rusaj bardoj (kaj ne nur bardoj). Tradukitaj germanen estas nur la plej konataj, kiel Okuĝava kaj Visockij, sed, sincere diri, tiuj tradukoj al mi ne tre plaĉas. En esperanto ekzistas multaj brilegaj tradukoj - mi menciui ĉi tie BRONŝTEJN kaj ZAJDMAN, sed estas ja vico de aliaj tradukantoj. En Germanio ni povas do prezenti rusan kulturon pere de esperanto al germanaj esperantistoj. Proprajn kantojn verkas ĉe ni Sergej.

K: Ĉu vi ĝuas vian kunlaboron? Kion vi atendas de via kunagado?

G.G.: Certe, ni ĝuas la kunlaboron. Ĝi ne estas facila, sed estas ege utila sperto. Ni estas tre diversaj personoj: inĝeniero kaj scientisto, bardo kun 30-jara sperto, Sergej; kantistino kaj pedagogino, hieraŭa studentino, Olga; kaj mi - programisto, preskaŭ loĝanta en interreto. Nia kunlaboro pliriĉigas ĉiujn el ni kaj donadas novajn ideojn.

K: Kio pri prezentado de via kolektivo al vasta publiko? Ĉu ekzistas alirebleco ĉe radiostacioj - nepra kondiĉo por amasa diskonigado?

G.G.: Ni kontaktas kun Radio Dreieckland en Germanio. Ĝi havas du-semajnajn programojn pri/en esperanto. Somere ili elsendis intervujon kun mi (germanlingve) pri KEF (mi feliĉe ĉeestis en Helsinko en Julio 2005).

Kiam ni registros niajn unuajn kantojn, ni rekontaktos la radiostacion. Mi ankaŭ ekkorespondis kun ITV – la internacia televido. Espereble, la kunlaboros sukcesos.

K: Kiujn planojn vi havas?

G.G.: La nunaj planoj de „Aspiro“, krom partopreno en venontaj esperantistaj vojaĝoj, estas registri KDo(j) n, por la projekto "Kantoj de diversaj popoloj de la mondo en la internacia lingvo esperanto." La projekto celas kreadon de „kantaj pontoj“ inter malsamaj popoloj, kiel rimedon por multkulturaj kontaktoj kaj interpopola komunikado. La propraj monrimedoj de „aspirantoj“ por tio certe ne sufiĉos, do ni dankos subtenon de la esperantista komunumo.

K: Via mesaĝo al la legantoj de "K"?

G.G.: Mi dankas al redakcio de "K" pro la ebleco rakonti pri mi kaj "Aspiro". Kaj al la legantoj:

Komencantoj, komencantoj,
bone lernu Esperanton!

(vortoj el populara esperanto-kanto – la red.)

Estimataj legantoj!

Sur la paĝo 5 de "K"-2005-5, en poemo de B. Ragnarsson "L' insulo de l' poeto" en la 4-a strofo, 2-a linio anstataŭ "nur" legu "sur".

Sur la paĝo 9 de "K"-2005-6, mankas nomo de la aŭtoro antaŭ hajko "Vesperkrepuske...". Aŭtoro de la hajko estas **SAKAMOTO Eriko**.

La redakcio petas vin konsideri tiujn ĉi korektojn.

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Virino, 59-jara, komencantino.
Int.: teologio, naturo, lingvoj,
vojaĝoj, landoj: Italio, Francio,
Danio, Grekio, Finnlando, Ĉinio.

Ludmila Kostina

pk. 77, Blagoveščensk,
Amurskaja obl., 675000

Rusio

luda@kostin.info

Mi estas 22-jara fraŭlino,
komencantino, studentino
pri kontoj. Int: teniso kaj
mia profesio.

Iris Valdespino Rojas

Meksikurbo,

Meksiko

paypetit@yahoo.fr

22-jara viro, komencanto. Mi
studas informteknologion. Int:
lingvoj, filmoj kaj libroj. Mi ser-
ĉas gejunulojn, kiujn interesas
aliaj lingvoj kaj kulturoj.

Jarno Liuttu

Tampere,

Finnlando

jarno.liuttu@mesta.net

Mi estas 37-jara fraŭlo, ko-
mencanto.

Rezendes Dan

P. O. Box 564

Nantucket

MA 02554

Usono

xgenra@hotmail.com

Mi estas 22 jara virino, kome-
ncantino. Int: lingvoj, landoj, kul-
turoj, amatora radio en kurtaj
ondoj; legi librojn, muziko, as-
tronomio, astrologio.

Tammie Evans

Eastbourne,
East Sussex,

Britio

m3ent@dsl.pipex.com


Mi estas 21-jara junulo, pro-
gresanto. Mi studas en uni-
versitato komputilojn, sed mi
ankaŭ ŝatas lingvistikon. Mia
gepatra lingvo estas hispana.
Plaĉas al mi korespondi pri in-
terlingvistiko, malkapitalisma
movado, necesbezono de la
malriĉaj popoloj kaj pri kon-
struado de alia pli homara
mondo.

Eduardo Adam Navas Lopez

Colonia Prados de Venecia IV,
pasaje 10, grupo 12, casa #14,
Soyapango

Salvadoro

aliamondano@gmail.com



Gundt Andrej [Trudovoje, Rusio]

Mi estas 49-jara viro, mi la-
boras kiel muzikisto, klarinetisto
kaj saksofonisto. Int: vojaĝoj,
fotado, amikiĝi kun samhobian-
toj.

Cheng Yonghua

P. O. Box 2421-2,
Beijing 100089,

Ĉinio

chengyong_hhh@yahoo.com.cn

13-jara knabo, komencanto.
Int: lingvoj, biciklado, beleco de
naturo, teniso, komputiloj, vo-
jaĝoj, legado. Mi serĉas junajn
esperantistojn por havi
amikojn.

Guillain Potron

Lillo

Francio

guipotron@yahoo.fr

Mi estas 41 jara viro, kome-
ncanto. Mi estas aktoro, ensce-
nigisto, komputisto. Mi satus
korespondi paper-poŝte kaj
rete. Int: homa interkomuni-
kado, teatro, dancoj, muziko,
kino, pentraĵoj, ekologio.

Jaillet Pierre

6 rue de l'arcade

63130 Royat,

Francio

pierre.jaillet@ouvaton.org

26-jara studento el Maroko,
studas nun en Barcelono por
esti inĝeniero kaj interesiĝas pri
kulturoj de popoloj, lingvoj, arto
kaj sporto. Parolas la araban,
la francan, la hispanan, la ita-
lan kaj la anglan, komencis
lerni la germanan kaj ŝatus
kontakti germanajn esp-istojn.

Gharbi Mohamed

Carretera de Vic,

Num : 72, 3-4; 08272

Sant Fruits de Bages

Barcelona

Hispanio

gh79esperanto@yahoo.fr

Mi estas 55-jara virino. Int:
naturo, politiko, interŝanĝi poŝt-
kartojn. Mi dez. kor. kun amikoj
el la tuta mondo, pli-malpli
samaĝaj kun mi.

Grças Pereira

Natal,

Rio Grande do Norte

Brazilo

gracaspereira@yahoo.com.br

30-jara viro, dez. kor. pri naturo,
lingvoj, biciklado, vojaĝado,
komputiloj, naĝado. Mi volas ko-
respondi kun homoj el la tuta
mondo, aĝo ne gravas. Mi
ankaŭ ŝatus renkonti miajn kore-
spondantojn.

Rick de Wolf

Castricum

Nederlando

natlib1@yahoo.co.uk

Mi estas 52-jara viro. Mi la-
boras kiel bibliotekisto.
Mi ŝatus korespondi paper-
poŝte kun geamikoj, precipe el
Rusio. Mi interesiĝas pri kul-
turo en plej vasta senco.

Guido Thys

Guldenpad 18

B-2290 Vorselaar

Belgio

20-jara komencantino studas
biologion en la universitato de
Innsbruck. Mi ŝatus sporti kaj
iri sur la montojn; legi librojn,
viziti kinejojn. Mi amas amuziĝi
kun geamikoj. Skribu al mi!

Verena Gruber

Wörgl,

Aŭstrio

verena.gruber@gmx.at

komencanto@r66.ru

<http://Komencanto.narod.ru>

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

